

4/11/91

AVANCO 191

oficiala organo de kuba esperanto-asocio

enhavo

Orlando Raola González
Por vekl eĵojn kaj partoprenon 3

Alvoko al Esperanto-instruistoj 4

kultura panoramo

Michel Duc Goninaz
La problemo de la normo en Esperanto 5

havano vokas

Nova frekvenctabelo 10

Konkurso «Esperanto: Centjara kulturo» 11

la radetoj

Orlando Raola González
Saluton! 12

juna ondo

Alexis Otero Castellón
Iniciato plenigas vakuon 13

la lingvo mem


Andrés Piñera Prieto
Fonetikaj problemoj de la kubaj Esperanto-parolantoj 14

Avanckonkurso 15

Strategia Plano de Kuba Esperanto Asocio 16



havano, la 4an de
novembro 1991 • n-roj 1-
2/91 • aperas kvarfoje jare
(sed ĉijare nur dufoje!) • el-
donas kuba esperanto-
asocio, pŝ. 2018, 10200
havano, kubo. telefono 40-
4484 • ĉefredaktoro orlan-
do raola gonzález • kunla-
boris alberto fernández-
calienes, alexis otero,
andrés piñera • pliaj kun-
laborantoj serĉataj • prezo
de unu ekzemplero en-
lande 0.50 cup, eksterlande
2.00 nlg aŭ 2 irk, pagendaj
al nia konto ĉe uea keax-u
• subskribitaj artikoloj espi-
mas la opiniojn de ties
aŭtoroj • ĉiuj rajtoj rezerv-
itaj • reproduktado per-
mesata, bonvolu indiki la
fonton kaj sendi du ek-
zemplerojn al la redakcio.



Atenton!

**Alvenis la
atendata horo
por legi
Avancon!**

estimataj,

jen denove ni sukcesas enmanigi al vi ankoraŭ freŝinke novan numeron de *Avanco* (numeroj 1-2/1991, eĉ se tion ne indikas la kovrilo!). Jam ni ne volas paroli pri kutimaj rubrikoj: ĉiam vi trovos ĉe ni ion novan. Estas nur via respondeco sciligi al ni ĉu daŭrigi tiun vojon, ĉu ŝanĝi ion ajn. Espereble nia venonta numero aperos antaŭ la kunsido de la komitato januare en Bajamo. Ĝis tiam deziras al vi profitdonan legadon via redaktoro,

Olaf

Por veki efĵojn kaj partoprenon

Orlando Raola González

Ke ni disponas tiun ĉi modestan revuon, kaj ke ni daŭre aperigas ĝin, malgraŭ la tre malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj travivataj de nia lando, estas faktoj kiuj sentigas al ni sufiĉe gravan respondecon. Kaj se ni sukcesas elporti ĝin, komprenu ke tiucelan energion ni povas eltiri nur el la absoluta konvinkigo pri la valideco kaj utileco de *Avanco*.

Sed ni disigu teorion disde praktiko. Ĉar teorie, ni povas listigi centon da bonaj kialoj por pravigi ĝian aperigon fare de Kuba Esperanto-Asocio. Ekzemple: ĝi povas roli kiel nemalhavebla informfonto por aktivuloj kaj gvidantoj tutlande, rilate la fendaĵojn kaj atingojn en nia ĉiutaga laboro; ĝi povas ebligi al kiu ajn respondeca asociano komuniki al ĉiuj ceteraj siajn ideojn, kaj diri ĉu la nuna vojo estas taŭga aŭ maltaŭga, konservenda aŭ ŝanĝenda; ankaŭ ĝi povas efiki simple kiel bona legmaterialo por tiom multe da homoj kiuj sin demandas kiel utiligi Esperanton post ellerno. La favorajn kialojn ni povus multigi ĝishorizonte... Kiel bonaj esperantistoj, ni plene fidus tiujn idealojn kaj pretas same sindiĉe kaj konstante labori por ke ili plenumiĝu, eĉ en nekredeble malhelpaj materiaj kondiĉoj.

Sed nia konfesita esperantisteca idealismo ne devas blindigi nin: ni maltrankvilige konstatis, ke ĝis nun la alvokojn de *Avanco* restis sen rezulto.

Ni dum longe alstrebas al malkovro de la kialoj por tiu silento, kaj tion ni faru

tuj, ĉar antaŭ ni malfermiĝas nur du eblaj vojoj: disbati la silenton kaj krei veran komunikan ciklon, tiel ke la utileco de tiu ĉi publikigaĵo translokigiĝu de la teoria kampo al la praktika, aŭ serĉi pli celkonformajn komunikilojn inter la membroj kaj la gvidantaro de KEA.

Bonvolu kompreni la ĉi suprajn asertojn ne kiel alarmigan kaj pesimisman eldiraĵon, sed kiel instigon al vera diskuto pri la rolo kaj estonteco de nia asocia revuo.

Eĉsupraĵa traĵigardo en la historion de la tutmonda Esperanto-movado tuj konvinkos eĉ la plej skeptikajn pri la graveco de presitaj organoj por solidigi kaj pluvivigi la aferon. Ilia efiko kiel interligiloj, la ebleco doni al ĉiu leganto la senton de aparteneco, dum la cent kelke da jaroj dum kiuj evoluas Esperanto estas preterdube pruvitaj.

Do, se ni vere estas komunumo, la tiel nomata kuba provinco de Esperantio, estas logike kaj neeviteble, ke ni havu ion komunan, ke ni ĉiuj pretu iomete oferi por ke tiu io komuna plikresku, plibonigiĝu, plibeligiĝu.

Tiel, karaj legantoj, ĉifoje ne aperos blanka kolumno inter la paĝoj de *Avanco*, sed ni tute certas, ke reage al tiu ĉi helpo-krio, per leteroj vi amase superŝutos viajn plej humilajn redakcianojn.

Antaŭdankon!

Ĉu vi konas ILEI? Ĝi estas la faka organizaĵo pri edukado kaj instruado. Ĝi havas sian juran sidejon en la Respubliko San Marino, kaj sekciojn en granda nombro da landoj.

La celo de ILEI estas la edukado al estimo de la homo kaj interkompreniĝo inter la popoloj. Inter la taskoj por atingi tiun celon ni povas menci:

- a) Unuigi instruistajn Esperanto-organizaĵojn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn altlernejojn.
- b) Atenti, esplori kaj analizi la pedagogiajn problemojn en la instruado kaj edukado kaj labori por la solvo de tiuj problemoj.
- c) Organizati interŝanĝojn de spertoj el la pedagogia scienco kaj praktikado por

plibonigo kaj modernigo de la Esperanto-instruado.

- e) Organizati pedagogiajn konferencojn kaj laborkunvenojn.

La statutoj de ILEI rimarkigas ke ĉiu persono kiu rekonas la statuton, sin okupas pri edukado kaj/aŭ instruado, povas membriĝi.

ILEI havas oficialan organon, *Internacia Pedagogia Revuo* IPR. Tia revuo aperas kvarfoje jare kaj ĉiuj membroj ricevas ĝin.

Baldaŭ en nia lando oni fondos la kuban ILEI-sekcion. La jarkotizo estos \$10.00, kaj inkluzivas la abonon al IPR.

Rilate al la pago de la jarkotizo ni informos vin kiam ni ricevos la akcepton fare de ILEI. Interesitoj bonvolu plenigi la jenan aliĝilon:

ALĜILO AL LA KUBA SEKCIO DE ILEI

Nomo kaj familinomoj de la instruist(in)o:

Privata adreso:

Konstanta Identokartnumero:

Privata telefonnumero:

Laborejo:

Laboreja adreso:

Laboreja telefonnumero:

De kiam vi instruas Esperanton?

Ĉu vi nuntempe instruas?

Se jes, kiun nivelon vi instruas?

Nomo de la lernejo:

Adreso de la lernejo:

Sendu la plenigitan demandaron al:

Héctor Jiménez Batista
Sekretario pri Edukado
poŝtfako 2018
10200 La Habana

Elkoran saluton por tiuj, kiuj el Avanco plej ŝatas KP. Ĉar ni komprenas kulturon en la vere plej vasta senco, hodiaŭ ni dediĉas nian tutan rubrikon al interese kaj malmulte konata temo, kiuj tuŝas ne nur la lingvon, sed eĉ la kernon mem de nia Esperanta kulturo. Guplenan legadon!

La redaktoro

La problemo de la normo en Esperanto

Michel Duc Goninaz

Enkonduke

Iel paradokse, sed nur ŝajne paradokse, la problemo de la normo ne ekzistus, se Esperanto estus fiksita, senŝanĝa kodo. En tia hipotezo la nocio «normo» estus senutila; ekzistus nur reguloj kaj eventualaj pekoj kontraŭ tiuj ĉi reguloj. Sed ĉar Esperanto estas «vivanta lingvo», la problemo de la normo ekzistas por ĝi same kiel por la naciaj lingvoj. Ĝi estas problemo lingvosciencia kaj sociologia kaj sekve ĝi estas pritraktebla nur se lingvosciencia studo de Esperanto ekzistas. Sed, same kiel por la naciaj lingvoj, ekzistas problemo pri la difino de la nocio «normo». La du unuaj difinoj de «normo» donitaj en PIV en kadro ne specife lingvistika bone spegulas la distingojn, kiujn faris ankaŭ lingvistoj:

- 1) ordinara, laŭregula stato,
- 2) jura preskribo aŭ regulo.

Same, E. Coscru¹ distingas inter «normo» (kiel oni diras) kaj «ĝusteco» (kiel oni devas diri) —kion ni povus nomi respektive «lingvouzo» kaj

«gramatikeco» aŭ «preskribo» kaj «preskribo». Martinet² adoptis la unuan difinon, akceptante tamen nuancon: laŭ li en la normo troviĝas tio, kion akceptas (aŭ toleras) la parolantoj. Tiu ĉi transira difino tre taŭgas, ĉar la limo inter ambaŭ difinoj ne estas strikta kaj ne transpasebla: unuflanke, la plej severaj puristoj ne povas ignori la efektivan lingvouzadon —sen kiuj la lingvo simple ne ekzistus, aliflanke multaj efektivaj kaj oftaj eldiraĵoj estas konsiderataj de la parolantoj mem kiel eraroj, rompantaj la normon. Por ambaŭ difinoj estas malfacile trovi sciencan referencon. Eĉ por la naciaj lingvoj, la difino de normo (en unu aŭ alia senco) havas eksterlingvajn kriteriojn.

En la XIX jarcento oni difinis la ĝustan uzadon de la franca lingvo kiel «la uzadon de la bona pariza burĝaro» kaj por la nunaj soveta lingvistoj la portanto de la rusa literatura lingvo devas esti denaska rusparolanto, urbano, kaj havi almenaŭ mezgradan instruitecon.

Ni konstatas, ke la unua demando eĉ ne estas: «Kion signifas la termino normo?» Laŭ la premisoj de Chomsky, la denaska informanto atestas pri la gramatikeco de la eldiroj, sed tiu difino

1 E. Coscru: Sistema, norma y habla, Teoria des lenguaje y lingüística general. 1962, p. 90.
2 A. Martinet: Eléments de linguistique générale, Paris 1967, 2-a eldono, p. 150.

kondukas al tiaj diverĝoj, ke la lingvisto devas arbitracii, do arbitri.

Koncerne planlingvojn, kia Esperanto, la problemo de la normo povas aspekti samtempe pli komplika kaj pli simpla. Unuflanke, la socia bazo de Esperanto, lingvo neta, estas tre heterogena kaj dissemita tiel, ke ne ekzistas sufiĉe densa loĝantaro uzanta ĉiutage la lingvon. La denaskaj esperantistoj, tre malmultaj, informas fakte ne pri la lingvaĵo de la ĉirkaŭa socio, sed pri tiu de la gepatroj, kiuj ĝenerale ne estas denaskaj parolantoj. Fronte al tiuj malfacilaĵoj — aŭ ignorante ilin! — oni plej ofte referencas al Zamenhof kaj al la Fundamento, kiu devas garanti la lingvan unuecon kaj eviti ties disdialektiĝon. Tio ŝajne simpligas la problemon: la normo estas — por la plej granda parto de la esperantistaro (inkluzive la nunan) — la «Zamenhofa» aŭ «Fundamenta» Esperanto. En okazo de dubo aŭ disputo (kio pruvas, ke tiuj ĉi referencoj ne sufiĉas!) oni povas alvoki la aŭtoritaton de la Akademio aŭ de respektataj gramatikistoj (kiuj foje ne samopinias) tiel, ke lingvaj polemikoj similas al teologiaj disputoj. Sed tiuj konsideroj estas eksterlingvaj: ili informas pri la kondutkutimoj de la esperantistoj, ne pri la lingvo mem.

Sed estas evidente, ke la normo ne estas kreata de la gramatikistoj aŭ de la Akademio. Kiel ĉiu lingvoparolanto, la esperanto-komunumo ellaboras normon por-konservi kaj evoluigi la eblecon de komunikado. La problemo, rigardata sub tiu ĉi vidpunkto, povus ŝajni do pure praktika: la normo povus esti difinita kiel la tuto de la procedoj, kiuj obligas interkomprenon. Sed ĝi ne estas nur praktika; ĝi estas ankaŭ etika kaj socia, ĉar ekzistas ia lingva patriotismo, kiu pelas la

homojn al la konscio pri «bona lingvaĵo», pro — sed kelkfoje sen — la influo de la tradiciaj aŭtoritatoj.

Aliflanke, la evoluo de la lingvo signifas ŝanĝojn en la normo (almenaŭ en la senco de «lingvo-uzo»). La referenco al tiuj aŭtoritatoj, kiuj fiksus neŝanĝendaĵojn aŭ oficialigus ŝanĝojn, estas nur parto de la problemo. Paroli pri la normo signifas do ne esti bridata de la dikotomio diakronio/sinkronio, sed permesi al si diakronian rigardon malgraŭ la malgranda historio de Esperanto.

1. Ortografio kaj prononco

La prononco bone spegulas la diferencon inter ambaŭ difinoj de la normo. La preskriboj de Zamenhof, de la instruistoj aŭ aŭtoroj de lernolibroj estas aŭ malprecizaj aŭ kontraŭdiraj. La prononckutimoj estas tre heterogenaj kaj influataj de la nacilingvaj prononcoj. Ĝusta estas la prononco, kiu ne kaŭzas konfuzojn inter la fonemoj de la lingvo. La aŭtoroj de la *Plena Gramatiko* penis difini normon laŭdire bazitan sur la uzado, sed fakte ne spegulanta ĝin.

Dume, la esperanto-parolantaro iom post iom konstruis al si pli kaj pli unuecan normon, ne respektatan, sed agnoskatan de ĉiuj. Ĝi estas negativa: plej bone elparolas tiu, kies geografian aŭ etnan devenon oni ne povas facile rekoni.³ Do la unua kaŭzo de unueciĝo ne estas ubeo al preskribo, sed la horizontala rilatoj inter la esperantistoj — ampleksigantaj kun la plimultiĝo de la renkontoj. Sed ankaŭ ludas rolon la vertikala faktoro, t.e. la influo de la modeloj. Zamenhof diris, ke Esperanto estu elparolata kiel la latina lingvo en la lernejoj de lia lando (Pollando aŭ Ruslando?). Tiu preskribo povas ŝajni stranga, sed ĝi estis tre

3 Pli detale pri la la karakteroj de la normo en prononco vidu: J. Wells: *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam 1977, UEA, p. 25-26.

ŝagaca: Esperanto troviĝas —sur la fonetika tereno— ĉe la tuŝpunkto de la mediteraneaj latinidaj kaj de la slavaj lingvoj; jugoslavo, poloj, italoj, katalunoj k.a. certe povas plej spontane respekti la normojn de la esperant-lingva prononco. La influo de famaj oratoroj (kiel la kroato Ivo Lapenna) aŭ de radielsendoj (kiel la ĉiutagaj elsendoj de Radio Varsovio) eblas nur tial, ĉar la esperanto-parolantaro rekonas en tiuj modeloj normon, kiun ili jam antaŭe agnoskis implicite. Ni konstatas ĉi tie dialektikan rilaton inter la «bazo» kaj la modeloj.

La ortografio ne starigas tiajn problemojn. Kiam okazas ŝanĝoj, ili estas samtempe fonologiaj kaj ortografiaj. La plej konata fenomeno estas la konkurenco inter *h* kaj *k*. Por multaj vortoj (*tekniko, psikologio, arkitekturo*), la normo-gramatiko, kiu toleras ambaŭ formojn, estas pli liberarala ol la lingvouzo, kiu trudas la fonemon *k*. Ni retrovas ĉi tie socian leĝon; la normo vertikala estas liberarala, kiam tiu liberaleco ebligas la konservadon de malnovaĵoj. Tamen, ekzistas kelkaj vortoj, kies ortografio povas prezenti variaĵojn: *buĝeto, maĉo* (foje skribataj, sub influo de vortaristoj: *buĝeto kaj maĉo*, kion ne pravigas la prononco).

La reformo de la ortografio estas nur teoria problemo: la proponantoj de la reformoj estas same adeptoj de la aŭtoritata normo, kiel la obstinaj rifuzantoj: ambaŭ volas fiksi la ortografion. Tial venkas la konservemuloj, ĉar ili estas pli konsekvencaj. Ĝis nun la ortografia sistemo estas unueca kaj la solaj problemoj —la uzo de majuskloj aŭ minuskloj por iuj substantivoj (popolnomoj), nefiksiĝo de la normo por inter-

punkcio, fojfoja uzo de *k* anstataŭ *kaj*, entute do malgravaĵoj.

2. Vortformoj

Neologismoj, proponataj de diversaj flankoj, prezentigas foje sub konkurencaj formoj. oni konstatis iam konkurencon inter *trabanto* kaj *satelito*, *skreno* kaj *ekrano*, *ŝofero* kaj *ŝoforo* k.s. Ankorau nun oni konstatas konkurencon inter *teamo* kaj *skipo* kaj diverĝaj formoj de iuj vortoj kiel: *preenco/precedento*, *aprezil/apreci*, *firmo/firmao*, *pulvero/pulvoro*, *komputero/komputoro/komputilo*. La tradicia uzo de *ujojollando* estas aparte interesa: la aŭtoritata normo (la Akademio kaj la konservemuloj) akceptis la konkurencon *ujojollando*, sed havis rifuzan sintenon al *-io*. La lingvouzo pli kaj pli disvastigis ties uzon (ĉefe en la laboristaj medioj) tiel, ke la Akademio finfine deklaris ĝin tolerebla. Oni nun observas la konstruadon de sistemo, en kiu *-io* kaj *-lando* obeas al certa distribuo: Bulgario, Italio, Ĉinio, sed Pollando, Svislando, Skotlando.

3. Morfologio kaj sintakso

Tio ĉi estas tre vasta temo, el kiu mi tuŝos nur kelkajn punktojn:

1. Uzo de prepozicioj kiel adverboj: apartenas al la nuna normo de la lingvo la teorie negramatika uzo de *ĉirkaŭ* kaj *ĝis* kiel adverboj («La urbo nombras ĉirkaŭ centmil enloĝantojn», «por tio oni povas pagi ĝis dumil markojn»).

Por la prepozicio *po* la afero estas pli komplika, ĉar ĝia uzo ankoraŭ ne fiksiĝis: *po* estas uzata foje prepozicie (tiam ĝin sekvas la nominativo), foje adverbe (tiam la sekvanta objekto alprenas la akuzativon): «Ili ricevis po kvin dolaroj(n)». Plie, *po* estas ofte uzata kontraŭnorme sur la semantika tereno: «...8 horoj posemajne, dek kartoj posekunde»

kaj oni povas sin demandi, ĉu tio ne estas la komenco de nova normo.

2. Uzo de prepozicioj antaŭ infinitivo: la Zamenhofs normo akceptis en tiu rolo la prepoziciojn *por*, *anstataŭ*, *krom*. Tra tiu breĉo la uzado enkondukis *sen* tiel, ke ni konstatas konkurencon inter la tradicia formo *ne...ante* kaj la nova *sen...i* kun ebleco de sencdistingo inter ambaŭ. Nun starigas la demando (ĉe se ĝi estas ĝis nun pure teoria): ĉu estus laŭnorme aŭ kontraŭnorme uzi la infinitivon post aliaj prepozicioj? Claude Piron starigis tiun demandon en la romano *Ĉu vi kuiras ĉine?* sub fikcia vesto («pro timi, ke oni kaptos lin»). Frazo, kiel «oni parolas pri enkonduki reformojn» ŝajnas ankoraŭ certe eksternorma, sed estas penseble, ke ĝi iam iĝos latinorma.

3. Uzo de la akuzativo post iuj prepozicioj: frazoj kiel «Mi iris ĉe lin», «Mi iris apud lin» ŝajnas nur eksternormaj, sed ili ja ne ofendus la implicitan normon de la lingvosistemo.

4. Enkonduko de novaj prepozicioj per uzado de la vortrezoro de la lingvo. Generale la neekzistantaj prepozicioj estas surrogataj de adverbo + prepozicio (modelo: *meze de*). Sed oni foje trovas — por la agadverboj — la komplementon *sen* prepozicio, do kun la akuzativo: *spite tion, koncerne tion*. Ĉar *spite* kaj *koncerne* evidente rolas kiel prepozicioj, la akuzativo foje malaperas: *spite tio, koncerne tio*. Tia uzo estis pravigita de Zamenhof. Sed ĝi signifus, se ĝi estus akceptita, ke adverbo povas esti uzata prepozicie.

La uzo de *far* starigis novan problemon: ĉiu lingvero kutime uzata en la kvar tradiciaj parolpartoj (*o, a, e, i* + aliaj verboformoj) povas esti uzata senfinaĵe, ekzemple kiel prepozicio? Precedencoj ekzistas por interjekcioj (*help!*, *fajr!*, *halt!*...), sed ĝis nun — ne por prepozicioj. *Far* jam enkondukiĝis en la uzadon. Estos interese ekscii, kian

prijuĝon donos pri ĝi la Akademio, kiu metis la problemon en sian tagordon.

5. Uzo de verba finaĵo post participa sufikso longe ŝajnis — kaj ankoraŭ ŝajnas al multaj — kontraŭnorma, kvankam la participaj sufiksoj obeas al la samaj leĝoj kiel la aliaj kaj oni ne komprenas, kiel, el struktura vidpunkto oni rajtas diri *videblas*, sed ne *vidatas*. La modelon donitan de Antoni Grabowski («Laŭdatu Jezu-Kristo»), duone kondamnitan de Zamenhof, reuzadis kelkaj personoj dum la pasinta jardeko.

6. Kombinebleco de la tabelaj elementoj starigas ankaŭ norman problemon. La tabelaj vortoj estas konsiderataj kiel unumorfemaj, sed Zamenhof rompis tiun unuformecon favore al *neni* (*neniĝi*). Aliaj lingvouzantoj ĝin rompis favore al la finaĵoj, kiuj do povus kombiniĝi kun aliaj lingveroj, ekzemple kun *ali*. Ĉu formoj kiel *aliu*, *alie*, *aliam*... akceptiĝos en la normon?

4. Semantiko

La senco de ĉiu lingvero neniam estas klara kaj definitive fiksita. Vorto havas signifon nur en difinita eldiro aŭ teksto. Tamen la vortaristoj devas doni indikojn pri la sencoj de la vortoj. Ili do konstante hezitas inter la du kriterioj de la «normo» (ĝusteco kaj uzo). Sur tiu tereno manifestiĝas tendencoj al unueciĝo. La uzado precizigas kaj fiksas — ĉe se provizore — la signifojn de kunmetaĵoj, kiel *elsendi*, *priskribi*, *aldoni*... Sed ankaŭ ekzistas tendencoj al disdialektiĝo, kiuj povas manifestiĝi pro tuta gramatika subsistemo (kiel atestas la fama disputo pri la pasiv-participaj sufiksoj *at* kaj *u*), apartaj vortoj (ekzemple la distribuo de la signifoj inter *ami* kaj *ŝati*) aŭ por la formoj de kunmetaĵoj (*centjarofarcento*). Se oni konsideras la ekzemplon de *ami/ŝati*,

konstateblas rompo inter la instruo de PIV kaj la normo de la lingvouzo.

Cetere, la semantika sistemo konstante reorganizigas por la enkonduko de novaj vortoj, kiu do ne kaŭzas simplan aldonon aŭ pliriĉigon kiam enkondukiĝis *heziti* kaj *aspekti*, la verboj *ŝanceliĝi* kaj *elrigardi* malvastigis siajn sencojn. *Vagonaro* povas malvastigi sian sencan pro enkonduko de *trajno* ktp.

Konkludoj

Rilate al la difino de la normo, la lingvo-respondeculoj staras antaŭ problemoj, kiujn ni povas resumi jene:

1. La lingvistoj devas priskribi la efektivan lingvo-uzadon, eĉ se tiuj ĉi enhavas formojn erarajn. Tamen por esti kohera, tiu priskribo devas kribri la realaĵojn kaj uzi statistikajn metodojn. La rezulto povas diverĝi inter la skriba kaj la parola lingvo. Ekzemple, ili registros kiel apartenantajn al la lingvo-uzo (aŭ al iuj partoj de la lingvo-parolantaro) la uzon de la participoj laŭ nete tempa senco (t.n. atismo), la uzon de la eraraj formoj, kiel *bani* anstataŭ *bani sin*, *evoluiĝi* anstataŭ *evolui*, *komenci* anstataŭ *komenciĝi*, *interesi* anstataŭ *interesiĝi*, *emeritulo*, *burgulo* anstataŭ *emerito* kaj *burĝo*.

«Erara» formo kiel *emeritulo* fariĝis jam kvazaŭ norma. Por iuj formoj estas eĉ malfacile determini kio estas «erara» eĉ en la plej formala senco de tiu termino: La uzo ankoraŭ ne decidis inter *sunumi* kaj *sunumi sin*, *sketo* kaj *sketilo*.

2. La gramatikistoj-normigantoj kaj la Akademio celas trudi —aŭ almenaŭ rekomendi— la «gustan» uzadon de la lingvo. Se ili rifuzas iujn ajn modifojn en la lingvo, ili obsede krotiĝas al la Fundamento (aŭ al tio, kion ili konsideras Fundamento) kaj bizance polemikas pri

la fundamenteco de tiu aŭ alia formo, dum la efektiva lingvouzado evoluas ekster ilia kontrolo. Se ili atentus la efektivan uzadon de la lingvo, ili proksimiĝas al la vidpunkto de la lingvistoj.

3. La instruistoj kaj aŭtoroj de la lernolibroj kaj vortaroj bezonas referencan aŭtoritaton. Tial ili ofte hezitas inter la vidpunkto de la lingvistoj kaj tiu de la normigantoj. Ekzemple, unu lernolibro por franclingvanoj aplombe asertas, ke oni ne rajtas diri «mi ŝatas ĉokoladon». Tiu ĉi aserto konformas al iu normigovolo de iuj vortaristoj, sed ne al la efektiva lingvo-uzado, sed foje la normigantoj estas toleremaj kaj la instruistoj devas mem ellabori normon, t.e. indiki la plej ofte uzatan formon. Ekzemple, por esprimi «la dua horo kaj 30 minutoj» oni povas uzi tri esprimojn same ĝustajn: *la dua kaj duono*; *duono post la dua*; *duono de la tria*.

Sed ili ne estas egalaj el la vidpunkto de la uzado: la unua el ili estas probable la plej «norma». Same, la instruisto povas instrui la formojn «ĝis revido» aŭ «ĝis la revido» kaj eventuale sciigi, ke la parola lingvo uzas la formon «ĝis...»

Ĉar preskaŭ ĉiuj E-parolantoj ekkonas la lingvon pere de instruistoj kaj lernolibroj, la problemo, kiun devas solvi tiuj ĉi en sia prezento de la lingvo estas tre grava: de ili oni postulas, ke ili sciigu pri la normo.

La instrua fakularo devas konstante teni la ekvilibron inter la koncerno de la bazaj reguloj de la lingvo, sen kiuj la lingvo disdialektiĝas, kaj la observo de la lingvo-uzado, sen kiu la instruata lingvo estus nevivanta, sed morta. La estonta instruado de Esperanto en la lernejoj —se tiu instruado disvastiĝos— pli kaj pli akriĝos tiun problemon.

4 Pri la problemaro de la eraroj, hezitoj, evoluo k.s. estas konsilata la ĉapitro 3a de F. Lo Jacomo: *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto*. Paris, 1981.

havano vokas...

La Esperanto-redakcio de Radio Havano Kubo antaŭ nelonge festis sian trian datrevenon. La redakcianoj invitas vin al amasa reago kaj sendado de materialoj, utilaj por riĉigo de la laboro. Jen la ĉiudimanĉa horaro valida de nun ĝis 1991.03.01



Redaktorino:

Maritza Gutiérrez G.

Kunlaborantoj:

Alexis Otero C.

Orlando Raola G.

Elsa Torres L.

Kunordiganto:

Humberto Casanova G.

Sendu viajn korespondaĵojn al:

Radio Havano Kubo
Esperanto-redakcio
poŝtfako 6240
Havano, Kubo

τ UTC	ν (kHz)	λ (m)	Regiono
0800-0820	11760	25.51	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
1700-1730	17750	16.90	Norda, Meza kaj Suda Amerikoj
	15340	19.56	
	15230	19.70	
	11875	25.26	
	11760	25.51	
1830-1900	5965	50.29	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	17770	16.88	
	17705	16.94	
2200-2220	15425	19.45	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	17770	16.88	
2230-2300	15425	19.45	Norda, Meza kaj Suda Amerikoj
	15230	19.70	
	11875	25.26	
	9620	31.19	
	5965	50.29	

**Radio Havano Kubo
Amika voĉo ĉirkaŭ la
mondo**

konkurso «esperanto: centjara kulturo»

Kun la celo instigi la kubajn esperantistojn al senĉesa kaj serioza pliklerigo, la Nacia Estraro de KEA alvokas la konkurson «Esperanto: Centjara Kulturo». Ĝin rajtas partopreni ĉiuj asocioj. La respondojn oni verkos en Esperanto. Limdato por ricevo estas la 20an de januaro 1992. Oni liveros specialan premion (\$100.00 nacia mono) kaj aliajn premiojn (librodonacojn). Ĉiu partopreninto ricevos krome dankdiplomon pro partopreno. La premion aljuĝos komisiono, nomumita de la Nacia Estraro (Martín Castro, Andrés Piñera kaj Orlando Raola; kiuj kompreneble ne rajtas sendi konkursaĵojn).

Konkursaj Demandoj:

I. Ĉiu el la ĉi subaj pecoj apartenas al iu gravega literaturaĵo el la originala Esperanto-beletro. Klarigu pri kiu verko temas, en kiu jaro ĝi aperis kaj kiu estas la aŭtoro.

- a) «Kaj dume palpe, blinde
ni venas, iras, eroj en ĉeno kies finon
ne formas ni nek vidos. Kuraĝon kaj obstinon!»
- b) «Ho, kie estas la konsolo
por mi —poeto sen popolo!»
- c) «Sed la paco ne longe daŭris, ĉar novaj registoj, kiuj nomis sin *batakoj*,
same komencis turmenti kaj tirani la popolon, kiel la *butukoj*.»
- ĉ) «Venere ruĝis
surplage dornohava
enorma kardo;
neniam mi forgesos
l'insulon Okinawa»
- d) «Fajron sentis mi interne
Vivi ankaŭ mi deziras, —
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras...»

II. Elektu laŭplaĉe unu el la supraj aŭtoroj aŭ verkoj kaj redaktu mallongan eseceton (maksimume 120 liniojn x 60 tajpspacoj) pri ĝi.

Sendu tuj vian respondon al:

Konkurso
«Esperanto: Centjara Kulturo»,
poŝtfako 2018
10200 La Habana.

Orlando Raola González

Karaj legantoj! Ekde la nuna numero (91/1), la revuo *Avanco*, plej grava komunikilo de Kuba Esperanto-Asocio havas novan rubrikon: *La Radetoj*. Kial ni nomis ĝin tiel?

Tre facile! Ĉu vi memoras pri la tempo, dum via infanaĝo, kiam vi lernis bicikli? Viaj karaj gepatroj volis ĉiam malebligi, ke vi falu teren kaj rompu al vi brakon aŭ la kapon. Tiucele ili fiksis al ambaŭ flankoj de via biciklo po unu radeto, kiuj sukcesis irigi vin rekte antaŭen, malgraŭ via foje mallerta direktado.

Same, por ke nia revuo *Avanco* ne fortimigu ankoraŭ ne tre lertajn Esperantistojn, aŭ simplajn komencantojn, la redaktisto klopodos redoni ĉi tie parton de la enhavo pere de la tiel nomata facila lingvo. Tiu rubriko estos via biciklo kun radetoj.

Sed eble vi demandas al vi: ĉu Esperanto mem ne estas facila

lingvo? Jes kaj ne. Onidire, ĝi tro malsimpliĝis dum la lastaj jardekoj, kaj pro tio, la redaktistoj de revuo *Kontakto* de UEA kunmetis liston de nur mil vortoj kaj vorteroj kaj nur per la vortoj aperantaj en tiu listo ni verkos la novan rubrikon. Ni pretas sendi al vi kopion de la listo se vi petas ĝin skribi al ni.

Sed atentu, amiko! Jam kiam la infano pli malpli akcepteble scipovas bicikli, la gepatroj nepre formetas la radetojn kaj la juna biciklanto kuraĝe iras sian propran vojon, sen helpiloj. Tiel same, kiam vi jam sukcesos tralegi *La Radeton* sen bezono serĉi nekonatajn vortojn en la vortaro, tio signifos, ke jam vi estas preta por pli seriozaj tekstoj, do la tufan enhavon de *Avanco* vi povos ĝuiplene tralegi.

Ĝis la venonta numero, ge-
knaboj!

Ni salutas la 2an Kuban Esperanto-Festivalon (KEF)

Dum ni redaktas la jenajn liniojn, la entuziasmegaj kamaradoj de la municipa estraro de KEA en Santo Domingo ĵus finas la pretigon de la 2a Kuba Esperanto-Festivalo. La tuta anaro de KEA renkontiĝos inter la 8a kaj la 10a de novembro ĉi-jare por kune festi kaj intersangi spertojn, kurbabili, kundanci, spekti niajn kulturajn atingojn, aĉeti librojn, kaj por multaj aliaj plej diversaj aferoj. Tiu ĉi numero de AVANCO aperas iel omage al tiu grandioza festego de la kuba Esperantistaro.

Felican Festivalon, gesperantistoj!

Iniciato plenigas vakuon

Alexis Otero

Nia kulturo alstrebas esprimi la plej pure naciajn tradiciojn kaj la universale kulturan senceon, malpropra al falsa universalismo, kiu malŝatas la aŭtentikajn valorojn en la kreado de ĉiu popolo. Ĉi-okaze mi ne intencas utiligi la junularon por ankoraŭfoje preparoli la kulturan panoramon (konstanta rubriko tre bone enkondukata de la nuna ĉefredaktoro). Tamen jam de antaŭ kelka tempo grava fakto igas min skribi pri ĝi (nepre pri kulturo kaj kultura agado).

La afero estas ke ĉe la havanaj Esperanto-lernejoj lastatempe aro da junuloj kunside klopodas fondi teatran grupon. Tiu-ĉele ili vizitadis la diversajn klasĉambrojn kaj varbis la trupo taŭgajn homojn, kaj kial ne, ankaŭ volontulojn kun la deziro elmontri, ke oni povas entrepreni serio-zan laboron tiukampe. Jen prikomentinda temo. Estis revo de antaŭaj JS-estraranoj starigi veran kulturan agadon en la kadro de tiu sekcio. Sed pro ĉiaj motivoj, kutime la ideo ne sukcesis transsalti ties cerbajn limojn kaj bedaŭrinde, neniam realiĝis. Miaopinie tio okazis pro la tre malbona kutimo enŝovi en la taskon la samajn homojn, tio estas, la ĝisoste laborŝarĝitajn. Aliflanke, oni prirevadis la fakton, ke ekstermovadaj teatraj kaj muzikaj grupoj solvus la problemon, tute forgesinte la enmovade kaŝitajn talentojn, kiuj eble jam forlasis Esperanton.

Nun, plengoje mi spektis kaj ĝuis la prezentojn fare de adoleskanta grupo kiu dancas, kantas kaj eĉ teatrumas kadre de la sabataj arangoj ĉe la Domo de Trobadoroj en Centro Havano. Kaj ĉiam la sama penso, forme de demando,

ĉirkaŭflugis mian kapon... ĉu estonte ili kapablos agi Esperante? Oni ne perdu la ŝancon esperantistigi ilin. Do Junulara Sekcio tre bone povus respondi pri tio, iri ĉe ilin estas unua paŝo, poste, kiel eble plej bone stiri la ŝipon. Mi estus sugestinta pliajn ideojn sed JS certe cerbumos pli detale kiel ajn.

Iniciaton oni havos, ĉar novaj estraranoj aliĝis por fortigi la laboron. Aliaj restis kaj realigas la tre necesan kulturan agadon ĉe junuloj, precipe nun kiam oni postulas iniciaton je ĉiuj niveloj. Tio inkluzivas aliajn esprimmanierojn kiel deklamadon, pentroarton, fotografion, krom aliaj interesovekaj artaĵoj. Tial mi instigas la junularon al apogo de tiu ideo kiu fine plenigos ĉiaman vakuon ĉe la junulara sekcio. Sukcesojn en tiom malfacila tasko kaj laste, mi konsilas agi kuraĝe, ĉar ĉia vere arta esprimo etendiĝas ĝis universaligo, kiu se ligata al nacia tradicio, samtempe esprimas nepre homan realon, kaj tiu ne estas malpropra al homo ĉe ajna latitudo. Ek al la arta kreado...

Aperis TAGIĜO, monata organo de la Junulara Sekcio de Kuba Esperanto-Asocio. La plejaĝa frato AVANCO elkore salutas la burĝonon, kaj deziras al ĝi kaj al ĝiaj laboremaj redaktanoj longan kaj informivan vivon!

Fonetikaj problemoj de la kubaj Esperanto-parolantoj.

Andrés Piñera Prieto

Esperanto estas fonetika lingvo, kies alfabeto konsistas el 28 fonemoj el kiuj 5 estas vokaloj kaj 23 konsonantoj; mi kalkulas inter la konsonantoj la fonemojn «ŭ» kaj «j», kiuj funkcias kiel duonvokaloj aŭ duonkonsonantoj; ilia valoro estas meze inter vokalo kaj konsonanto, ĉar memstare ne sonoras, tamen apud alia fonemo aŭdiĝas: «taŭga», «paĉjo», «ŭato».

Speciala trajto de Esperanto estas tiu, ke ĉiu vokalo estas alparolata aparte, ĉiu el ili kreas per si mem silabon.

Ni kubanoj, emas prononci la vokalojn —kiam ili estas kunaj en morfemo kaj kreas diftongon akorde al la hispanaj prononcreguloj— kvazaŭ unu silabon, kio misformigas la intonacion kaj aŭdiĝas la lingvon aliel. Tiun ĉi emon ni konstatas ĉe la morfemoj, kiuj enhavas la vokalojn «a», «o» aŭ «e» akompanataj de «i» aŭ «u», aŭ tiujn du lastajn kiel ajn formantajn paron: «kuirejo», «tiuj». Ekzemplon pri tio ĉi ni trovas ankaŭ en la vortoj «aero», «scienco», «diagnozo», «pioniro», «dualismo». Tiaj fenomenoj prezentigas plej ofte, kiam la akcentita vokalo estas el la tiel nomataj fortaj kaj la antaŭa estas malforta («pacienco»), male ne okazas, ĉar nia kutimo devigas nin ne prononci diftongon, tial ke la akcento rompas ĝin. Ni komparu: «piano», «agjoto» kun «balailo», «heroino». Kiam la vokalparó estas antaŭ la akcen-

tita silabo, tiam la elprononco de ĉiu vokalo aparte, ĉe ni, ne aŭdiĝas sen bona kaj konstanta praktikado: «sionismo», «soifanta».

Alia miskompreniga malfacilo por kubaj Esperanto-parolantoj troviĝas en la prononco de vokalfinaĵa morfemo sekva de vokalkomenca. Dum la prononco la kubaj Esperanto-parolantoj kutimas fandi la du vortojn. Ni analizu la predikativan sintagmon: «ne estas bela». Ĝi laŭ nia prononcmaniero, aŭdiĝas: [ne:stas bela] = «nestas bela». Kompreneble, tiu kiu ricevas la mesaĝon certe miskomprenas la informon.

Alrigardante bone, sed tre konkrete pro la mallongo de tiu ĉi studeto, ni povas ankaŭ diri, ke problemoj ankaŭ prezentigas ĉe ni kun la fonemoj «b» kaj «v», kiujn ni kutimas ne diferencii kaj tial, malfacilas scii ĉu ni ni aĉetas «veston» aŭ «beston», kio tute konfuzigas la aŭskultanton.

Prononcante la fonemojn «c» kaj «s» meze de morfemo, ni ne faras bonan diferencion; ni ne prononcas klare «c = ts» kaj tial okazas misoj: «celo» aŭdiĝas «selo».

Al la antaŭaj aferoj ni aldonas, ke povas ekesti en la sama morfemo du el la problemoj traktataj kaj ankoratŭ pli malfaciligas la kompreno, vidu: «servo» kaj «cerbo».

Finante tiun ĉi malgrandan analizon,

mi ne povas ne menciĝi la plej gravan misprononcon, okazantan pro la elizio de «s» ĉe la fino de konjugaciaj verboj, kio faras el la verboj substantivojn se ĝi estas futuro, adjektivojn se prezenco aŭ infinitivojn se ĝi estas preterito: «danco(s)», «danca(s)», «danci(s)».

La spaco de tiu ĉi laboro ne permesas al mi tuŝi ĉion, sed mi laste diros, ke bezonatas ankaŭ aŭdigi la fonemon «n», kiam ĝi funkcias kiel akuzativo aŭ simple meze de morfemo, sed prononci ĝin per la lango kaj ne per la gorgo (gloto) kiel ĝi aŭdiĝas antaŭ la fonemoj «k» kaj «g», tiun formon, kvankam ne malhelpas la komprenon, tamen aŭdiĝas la lingvon iel neble. La fonemon «n» ni devas prononci naze kompreneble, sed per la lango kontraŭ la supra dentaro.

Tiuj kelkaj aspektoj, se atentataj, permesos nin komunikiĝi sen ĝeno kun kiu ajn esperantisto, sendepende de lia gepatra lingvo.

Ĉu vi jam pagis vian kotizon?

- Jes. Gratulojn!**
- Ne Bonvolu pagi tuj! Ni plifortigu KEA-n finance.**

AVANCKONKURSO

Saluton, karaj legantoj de *Avanco*. Eble vi krios surprizite leginte la titolon de la nuna rubriko, sed ĉu plia konkurso?!

Kompreneble jes, ja la alipaĝa temas pri la konkurso de KEA, tre grava kaj kun tre respektinda premio... kaj ĉi suba estas ne malpli grava (temas pri la konkurso de nia stela revuo, oficiala organo de KEA ktp), kaj ĝi estas dotita per ne malpli respektinda premio (ja legindan libron oni ne trovas sur ĉiu stratangulo!). Sed bonvolu noti, ke estas niveloj de graveco kaj respektindeco, ĉu ne?

Do, ek al la respondo. Libropremion vi ricevos se via korekta respondo atingas niajn manojn antaŭ la apero de la venonta numero.

Demando n-ro 1/1991

En la jaro 1933, en Sovetunio aperis romano originale verkita en Esperanto, kiu restas ĝis nun kiel unu el la plej elstaraj verkoj de la historio de nia literaturo. Ĝia aŭtoro mortis tre juna (nur 35 jara). La ĉefheroo de la romano nomiĝas Vitalij. La stilo de la romano estas frapante vigla. Dua eldono aperis en 1977. Pri kiu verko temas? Kiu estas ĝia aŭtoro?

Sendu tuj vian respondon al:

AvancKonkurso
pf. 2018
10200 La Habana.

Kuba Esperanto -Asocio laboris ekde 1987 laŭ la tiam aprobita Ĝenerala Laborplano. La lasta sesio de la Komitato de KEA aprobis la Labortragon por la periodo 1991-93. Ĝi celas doni la ĝeneralajn gvidliniojn, por ke ĉiu instanco adaptu kaj adekvatigu siajn planojn al ĝi. Tio helpas al ni trovi la ĝustan vojon inter la ofte tre belaj —sed nerealigeblaj aŭ nerealigendaj— ideoj, kiuj krome ne signifas prioritaton por la tuta Asocio. Jen kelkaj paragrafoj el tiu gvida dokumento:

Disvastigo de la movado

La vivo de la movado dependas de la agado de la nunaj membroj. Esperanto restas daŭre valida kaj interesa temo por la publiko, eĉ se ĝi jam ne venas amase al niaj kursoj en kelkaj lokoj. Esperanto estas portanto de valoroj spiritaj kaj eĉ materialaj kiujn ni devas ekspluati por kreskigi la movadon. Bona informado pri Esperanto kaj kursoferto estas ĝenerale uzataj rimedoj por venigi novulojn al niaj vicoj.

Informado pri Esperanto

Tiu frazo por ĉiam anstataŭigu la ĝis nun uzitan terminon propagando. Malbone orientita «propagando» ridindigas la movadon, la asocion kaj eĉ la celojn de Esperanto mem. Informado ĉiam pli kaj

pli fariĝas agado, kiun ne kiu ajn povas entrepreni.

Nova kultura dimensio

La plej grava afero de tiu nova kultura dimensio estas la ĝeneraligo de la kompreno pri la fakto, ke la Esperanto-movado kaj la Esperanto-asocio estas precipe kulturaj institucioj, kie esprimiĝas komunumo de homoj posedantaj komunan lingvon. Tial la tuta agado devas kongrui tiun celon, kaj kompreni la kulturen disvolvon kaj engaĝitecon de la homoj kiel unuarangan prioritaton.

Kultura agado

La ĉefa celo de kultura agado estu disponigi al la homoj kiuj ellernis Esperanton unuavice, kaj ankaŭ al tiuj lernantaj, la trezorojn de la Esperanto-kulturo kaj de la kulturo de aliaj popoloj tra la Esperanto-ponto. Ankaŭ partopreni kreative en la transdono de niaj naciaj valoroj, kaj en la produktado de kulturvaloroj Esperantilingve.

Partopreno en la internacia movada fluo

La movado, malgraŭ ĉiaj insistoj ne vivas nur el aranĝoj. Ekzistas pulsanta vivo ankaŭ en la skriba Esperanto. Ni faru ĉion eblan por partopreni tiun vivon.

(daŭrigota)